

Program-libro

SES 2014

Somera Esperanto-Studado



Nitra, Slovakio
12.-20.7.2014

Salutvortoj

Karaj amikoj!

Estimataj partoprenantoj de la Somera Esperanto-Studado!

Bonvenon en nia antikva kaj samtempe moderna urbo Nitra, en kiun vi venis okaze de la Somera Esperanto-Studado.

Estas honoro por mi bonvenigi vin en Nitra – la urbo sub fama antikva Zobor, al kiu rilatas multaj mitoj kaj legendoj konservataj inter Nitra-loĝantoj de ĉiuj generacioj. Nitra estas la plej malnova urbo de Slovakio, la unuaj pruvitaj historiaj mencioj devenas el la jaro 828.



Bonvenon en urbo kiu same kiel Romo situas sur sep montetoj – sur Zobor, burga monto, Kalvario, Čermán, Borina, Vřšok kaj Martinský vrch. Ne ekzistas multe da similaj urboj pridonacitaj per tiom bela medio kaj favora situo kiel ĝuste Nitra. Al ĝia nomo rilatas komencoj de slovaka historio, nomoj de Pribina, Svätopluk, sanktaj Cirilo kaj Metodo, samkiel mencio pri la unua kristana preĝejo en regiono de Slovakio kaj mencio pri enkonduko de la unua slava skribsistemo.

Mi ĝojas ke la organizantoj de la somera lernejo elektis ĝuste Nitra kiel lokon por la aranĝo. Restas al mi nur kredi ke Nitra estos bona gastiganto de tiu ĉi internacia renkontiĝo de ŝatantoj de la internacia lingvo kiu instigas interkulturajn klerigadon, kunlaboron kaj komunikadon.

Oni scias pri Esperanto ke ĝi estas oficiala lingvo de neniu ŝtato, nacio aŭ etna grupo, pro kio neniu rajtas proprigi ĝin al si kaj ke ĉiuj havas la saman rajton uzi, disvastigi kaj evoluigi ĝin. Sed samtempe ĝi havas unu avantaĝon – ke ĝi ebligas al homoj komuniki egalnivele. Kaj tiun ĉi econ mi trovas simpata.

Al ĉiuj partoprenantoj de la Somera Esperanto-Studado mi deziras ke ili kunportu hejmen multe da belegaj travivaĵoj de nia urbo.


Jozef Dvonč
urbestro de Nitra



Saluto de organizanto

Estas tre agrable konstati, ke jam okan fojon ni havas la eblon kaj honoron okazigi SES. La aranĝo dum la jaroj evoluas kaj kio ankaŭ organizantojn tre ĝojigas – kreskas. Ni strebas okazigi aranĝon, kiu estu samtempe eduka kaj amuza – ja ne facilas tasko :) Tamen via partopreno konfirmas, ke ekzistas intereso pri ĉi-speca aranĝo. Ni elkore dankas al vi, ke vi decidis veni, riĉigi tiel la aranĝon – kaj efektive ja entute ebligi ties okazigon. Ni ankaŭ esperas, ke la aranĝo plu evoluos, pliboniĝos (kvalite, enhave, kvante) – pri tio ni bezonas vian helpon – partoprenu aktive la aranĝon, helpu al ni informi pri ĝi, kontribuu al la programo, venigu ankaŭ viajn konatojn ktp. Persone mi ŝatus tre danki ĉefe al instruistoj (kiuj estas la plej grava parto de la instruista parto de SES) kaj ĉiuj aliaj (helpantoj, organizantoj, artistoj ktp.), kiuj kunkreas kaj ebligas tiun ĉi aranĝon.

Fine nur deziro: ĝuu la aranĝon, lernu Esperanton kaj uzu ĝin – por tio ĝi ja estis kreita! Kaj ne forgesu: ĉi-jare unuafoje eblas partopreni eĉ du SESojn! La sekvan jam aŭguste en Rusio, apud Moskvo: <http://ses.ikso.net/2014/ru/>



Peter Baláž (Petro)

E@I-kunordiganto, SES-organizanto

Saluto de la lernu!-teamo

Bonvenon!

Ni ĝojas ke vi venis por studi Esperanton en bela Slovakio. Ĉe SES, vi ne nur plibonigos viajn kapablojn en Esperanto, sed vi ankaŭ renkontiĝos kun la varma kaj amikema komunumo de Esperanto-parolantoj. Kiel vi eble jam aŭdis, ni nun pretigas novan version de la paĝaro lernu.net kaj pro tio serĉas volontulojn por helpi nin en tiu grava laboro; teknika sperto kaj alta nivelo de Esperanto ne estas necesaj. Ni invitas vin aliĝi al nia teamo! Ĉi-semajne lernu, amuziĝu, kaj parolu Esperanton kun viaj novaj amikoj; ni esperas ke la bela sperto ĉi tie inspiras vin kontribui al la lernu!-komunumo kaj fariĝi volontulo ĉe lernu!



Skribu al teamo@lernu.net por ekhavi pli da detaloj pri tio, kiel vi povas helpi nin.

Bonan lernadon!

*Jevgenij, Neringa, kaj Erinja
la teamo de lernu.net*

Welcome!

We're thrilled that you've come to study Esperanto in beautiful Slovakia. At SES, you'll improve your Esperanto while you enjoy the warm and friendly community of Esperanto speakers. As you may have already heard, we are currently preparing a new version of the lernu.net website. We are searching for volunteers to help us in this important work; technical experience and a high level of Esperanto are not necessary. We invite you to join our team! This week, learn, have fun, and speak Esperanto with your new friends; we hope that the wonderful experience here will inspire you to contribute to the lernu! community and become a lernu! Volunteer.

Write to teamo@lernu.net to get more details on how you can help us make the site better for you and for other users.

Happy learning!

*Jevgenij, Neringa, and Erin
the lernu.net team*

Vitajte!

Sme radi, že ste sa prišli učiť esperanto do tejto krásnej krajiny, na Slovensko. Počas SES si nielenže zlepšíte znalosti esperanta, ale sa aj stretnete s priateľskou komunitou esperantských hovoriacich. Možno ste už počuli, že na nový rok spustíme novú verziu lernu.net, na ktorej už teraz usilovne pracujeme. Momentálne hľadáme dobrovoľníkov, ktorí by nám s touto dôležitou prácou pomohli; technické znalosti ani vysoká úroveň znalosti esperanta sa nevyžadujú. Tento týždeň sa učte, zabávajte a hovorte esperantom so svojimi novými priateľmi; dúfame, že táto pekná skúsenosť vás inšpiruje pomôcť lernu!-komunitě a stať sa dobrovoľníkom na lernu!

Pre podrobnejšie informácie, ako nám môžete pomôcť, napíšte na teamo@lernu.net.

Prijemné učenie!

*Jevgenij, Neringa a Erinja
tím lernu.net*






Organiza teamo

Organizado de SES iĝas pli kaj pli temporaba kaj hompostula tasko :-). Ni tre ĝojas, ke daŭre necesas pligrandigadi la organizon teamon, ĉar multiĝas ankaŭ la aliĝintoj. Pri la aranĝo krom ĉi-sube menciitaj personoj kunlaboras pliaj homoj, al kiuj ni elkore dankas pro ilia diversspeca helpo.



Peter Baláž (SK)
ĉeforganizanto



Katarína Nosková (SK)
ekskursoj, vizoj, instruado



Dorota Rodzianko (PL)
financoj, administrado,
surloka helpo



Zuzana Kožuchová (SK)
akceptado, helpantino
(novuloj, ekskursoj ks.)



Magdaléna Korábová (SK)
akceptado, helpantino




Rastislav Šarišský (SK)
libroservo



Vít Mišurec (CZ)
helpanto



Michal Matúšov (SK)
vespera/muzika programo
teknika ekipaĵo



Eva Fitzelová (SK)
ekskursoj, gufujo



Matthieu Desplantes (FR)
kinejo, retpaĝaro, teknikaĵoj



Marek Blahuš (CZ)
retpaĝaro, teknikaĵoj



Leon Schneldorfer (SK)
sporta programo, helpanto




Instruado / Instruistoj ☺

SES-organizantoj estas ĝojaj kaj fieraj povi prezenti al vi la plej grandan internacian instruistan teamon dum la nuntempe plej granda somera Esperanto-lernejo. La instruistoj estas por SES la plej gravaj personoj – ili venas, por ke vi foriru de la aranĝo pli riĉaj je novaj scioj, por ke via Esperanto-nivelo signife kresku dum tiuj ok tagoj. Ni tre petas, obeu ilin, lernu diligente kaj pruvu al ili kaj al vi mem, ke ili ne venis vane :-). Por ke ni povu gastigi ilin ankaŭ dum la venontjara SES!


Internacia teamo de spertaj instruistoj zorgos pri via lernado:



Stano Marček (SK)



Zlatko Tišljär (HR)



Víctor Solé (CAT)



Christophe Chazarein (FR)




Birke Dockhorn (DE)



Johannes Mueller (DE)



Przemek Wierzbowski (PL)



Szabolcs Szilva (HU)




Nina Pietuchowska (PL)



Tim Morley (UK)



Bertilo Wennergren (SE/DE)



Konstantin
Tiĥomirov (RU/PL)

Speciala kurso: *Esperanto-literaturo kaj kulturo*

Per Esperanto eblas ne nur ami kaj kvereli, kunsidi kaj forgesi akuzativojn, sed ankaŭ verki literaturajn tekstojn. Jam ekde Zamenhof en nia lingvo estiĝis poemoj, romanoj, noveloj kaj tiel plu ĝis kanto-tekstoj rande de beletro. Venu al nia kurso, kaj vi kleriĝos pri literaturo en Esperanto kaj ni montros al vi kiel verki (mal)bonan poemon!

Surbaze de la deziroj kaj de la konsisto de la partoprenantoj, ni traktos diversajn temojn, ekzemple:

* Enkonduko al la t.n. E-kulturo kaj E-literaturo, konkrete al la originalaj poezio kaj prozo kaj al la periodoj de la originala E-literaturo (laŭ Sutton)* Aparta pritrakto de pluraj gravaj aŭtoroj kiel William Auld, Baldur Ragnarsson, Roberto Passos Nogueira, Mauro Nervi, Mao Zifu, ktp. * Tradukado de beletraj tekstoj, Rilato inter kantotekstoj kaj poezio * Redaktado de internacia kultura kaj literatura revuo (kun Beletra Almanako kiel aktuala ekzemplo), Eldonado de Esperanto-libroj, Recenzado de beletraĵoj...

La kurson gvidas eminentuloj de la nuntempa Esperanto-literaturo:



Nicola Ruggiero (IT)



Jorge Camacho (ES)

Priskribo de programeroj

☺ = taŭga por komencantoj / suitable for beginners

Aligatorejo ☺

Aligatorejo estas loko (kaj tempo) kie (kaj kiam) vi povas praktiki aliajn lingvojn krom Esperanto. Fakte, paroli Esperanton kaj via(j)n denaska(j)n lingvo(j)n en la aligatorejo vi ne rajtas! La reguloj estas simplaj: vi skribas nomojn de la lingvoj kiujn vi parolas sur papereton kaj gluas ĝin al viaj vestaĵoj, por ke ĝi estu videbla al aliaj. Poste laŭ la paperetoj vi serĉas aliulojn kaj babilas pri io ajn. Vi ne devas scipovi multajn lingvojn – nur unu fremda lingvo krom Esperanto sufiĉas por ĉeesti.

Gvidas: Matthieu Desplantes kaj Marek Blahuš



A@I (Anonimeco ĉe Interreto) - Enkonduko

En la prelego vi povas ekscii kiel eblas kaŝaŭskulti komputilojn en Interreto kaj kiel (mal)sekura estas retpoŝto. Fine estos prezentata unu el la sekurigaj alternativoj al retpoŝto kaj rekomendoj por kaŝi sin en la amaso de retumantoj.

A@I (Anonimeco ĉe Interreto) – Retumado

Eĉ pli teoria kaj eĉ pli uzebla prelego. Tie vi skize ekscios pri funkciado de Interreto, kiel eblas identigi komputilon kaj vi ekscios pri programo por facila sekura retumado – teorie kaj praktike. Mi rekomendas antaŭe viziti la unuan prelegon.

Gvidas: Václav Zouzalík



Abstraktaj strategiaj ludoj

Klasikaj ludoj kiel goo, ŝako, ŝogio, damludo, ktp estas sen hazardo kaj sen kaŝita informo. Ekzistas miloj da similaj sed malpli famaj ludoj modernaj, ofte kun tre simplaj elegantaj reguloj sed profunda interesa strategio. Multaj ludeblas per ordinaraĵoj, kiujn vi probable jam posedas hejme, kaj senpage en diversaj retejoj. Jen superrigardo pri tiaj logikaj ludoj, kun eblo lerni kaj ludi kelkajn.

Prelegas: Russ Williams

Alternativo

Subteno de Vindozo XP finiĝis. Ĉu vi scias ke ekzistas alternativo por nepretendaj homoj, kiu estas pli sekura, bone funkcia kaj eĉ (laŭleĝe) senpaga? Venu kaj eksciu pli!

Prelegas: Václav Zouzalík

Arbaraj bestoj

Ni pensas ke pri arbaraj, malgravaj bestoj ni scias ĉion (almenaŭ ĉion interesan). Sed ĉu vi scias kiom pezas kojonoj de cervo? Aŭ kiel diferencigi per ramuro diversajn specojn de cervedoj? Pripensu tion – kaj/aŭ venu ekscii al tiu ĉi prelego!

Prelegas: Marta Adamus


Bulkvasto

Ni faros ludilojn de bulkvasto, fadenoj kaj bidoj. Bulkvasto povas esti kreitaj multkolore, kiel iu volas. Kaj tiaj ludiloj estos utilaj por ludil-teatro aŭ nur por amuziĝi.

Prelegas: Ekaterina Lozina

Ĉeĥaj animaciaj filmoj

Ĉu vi volas amuziĝi kaj konatiĝi kun ĉeĥaj animaciaj filmoj? Sed vi diras: mi ne konas la ĉeĥan lingvon, denove estos subtekstoj kaj mi ne komprenos! Ne timu, jenaj filmetoj (Pat kaj Mat) estas filmetoj sen dialogoj! Tamen, vi komprenos facile, kio



okazas en ĉiu filmo. Venu kun viaj infanoj, forgesu por unu horo pri uzado de Facebook, Gmail kaj aliaj komunikiloj...

Prezentas: Miro Piro

Ĉu instrui kantojn en niaj Esperanto-kursoj?



Lernantoj en niaj E-kursoj ofte laciĝas post kelkhora laboro. Tamen, se la kursgvidanto fine de la leciono prenas gitaron aŭ eksidas apud piano, kaj instruas al la kursanoj belan Esperanto-kanton, ili vigliĝas kaj lernas plu: per amuza kaj gaja maniero ili parkerigas tekstojn de la kantoj. Nia gasto Stano Marček instruos al vi, kun gitaro, kelkajn Esperanto-kantojn, konvenajn por niaj kursoj, kaj montros al vi, kiel vigligi per kantado la instruadon.

Prelegas: Stano Marček

Danckurso de Tango

Lernu dum SES ne nur Esperanton sed eĉ danci! Atendas vin tri lecionoj de unu horo kaj duono de "Enkonduko al tango" Venu kaj lernu tiun ĉi temperamentan dancon – vi certe ne bedaŭros!

Gvidas: Michela Concialdi

Danckurso de ĉardaŝo

Ĉardaŝo estas hungara temperamenta para danco en 2/4 aŭ 4/4 ritmo. Ĝia nomo devenas el la hungara „csárda“ = drinkejo. Estis kreita en la komenco de la 19-a jarcento surbaze de tordantaj dancoj kaj iom post iom disvastiĝis ĉe aliaj nacioj kaj landoj. Principo de la danco estas la turniĝado en paroj. Ne povas manki bela ĉardaŝa muziko enhavanta zimbalonon.

Gvidas: Jana Kamenická



Esperanta kvizo

En ĝi vi povos kontroli vian scion pri historio de Esperanto, ĝia literaturo, la movado... kaj gajni eĉ valorajn premiojn! Venu amuziĝi kaj samtempe montri, ke ĝuste vi scias ĉion pri Esperanto! :)

Gvidas: Nina Pietuchowska

Esperanto-literaturo

Ĉu vi legas Esperanto-librojn? Ĉu vi legas ilin ofte? Kiuspeca Esperanto-literaturo estas populara kaj kiu male? Kia kvanto de Esperanto-verkoj estas eldonata ĉiujare? Kial ni entute verku, tradukadu, eldonadu, aĉetadu, legadu Esperanto-literaturon? Kia estonto atendas ĝin? Kiuj estas la plej novaj furor-libroj en la Esperanto-movado? Ĉu kaj kiujn Esperanto-librojn indas entute legi? Venu diskuti kun aliaj libroŝatantoj kaj eldonisto(j) pri tiuj ĉi kaj rilataj temoj.

Prezentas/gvidas: Peter Baláž



Esperanto meetings / Esperanto-aranĝoj ☺

If you have just started learning Esperanto, one of the most important questions is "how can I use it afterwards". Naturally, one of the most enjoyable and entertaining ways of using Esperanto is to participate in national and international Esperanto events. Every year, thousands of them take place all around the world, and at least some of them are really worth visiting. Our main goal is to introduce to you the biggest and most significant Esperanto meetings. Of course, you can present here your own events as well. This lecture is beginners-friendly, in both English and Esperanto.

Se vi ĵus komencis aŭ komencas lerni Esperanton, unu el la plej gravaj demandoj estas „kie mi uzu ĝin poste“. Unu el la plej amuzaj kaj ĝuindaj uzoj de Esperanto estas ĉeestado en diversaj naciaj kaj internaciaj Esperanto-aranĝoj. Ĉiujare okazas miloj da aranĝoj ĉie ĉirkaŭ la mondo, kaj almenaŭ kelkaj el ili sendube estas ĉeestindaj. Nia ĉefa celo estas prezenti al vi la plej gravajn kaj grandajn Esperanto-aranĝojn. Kompreneble, vi ankaŭ rajtas reklami kaj paroli pri via aranĝo (se vi organizas iun). Tiu ĉi komencant-amika prezento okazos kaj en Esperanto kaj en la angla.

Gvidas, prezentas: Zuzana Kožuchová, Paulína Kožuchová

E@I – aktuale kaj skize pri ĝia agado

Ĉu vi konas E@I, sed eble ne bone konscias, pri kio la organizo ĝuste en nunaj tagoj (semajnoj, monatoj) okupiĝas? Ĉiujn freŝajn novaĵojn vi povos ekscii dum la prezento. La plej lastaj (sed ankaŭ nur planataj) projektoj, lastaj eldonaĵoj, retpaĝoj, EU-projektoj. Ni malkaŝos (preskaŭ) ĉion :-)

Prezentas: Katarína Nosková, Peter Baláž



FAQ about Esperanto / Oftaj demandoj pri Esperanto ☺



How many Esperanto speakers are there in the world? How fast can I learn this language? Why should one learn Esperanto, if English is spoken everywhere? Have these and many other questions regarding Esperanto ever popped in your head? We bet they have... Therefore, we invite you to our discussion, where we are going to rise and discuss all the frequent (or less frequent) questions you might have about Esperanto. This lecture is beginners-friendly, in English (and Esperanto).

Kiom da esperantistoj estas en la mondo? Kiom rapide mi povas lerni tiun ĉi lingvon? Kial oni devus lerni Esperanton, se la angla estas parolata ĉie? Ĉu vi iam ajn ekhavis tiajn aŭ similajn demandojn pri Esperanto? Ni povas veti, ke jes... Tial, ni invitas vin al nia diskuto, kie ni provos starigi kaj diskuti pri ĉiuj oftaj (aŭ malpli oftaj) demandoj, kiujn vi povas havi pri Esperanto. Tiu ĉi komencant-amika prezento okazos en la angla (kaj Esperanto).

Gvidas, prezentas: Zuzana Kožuchová, Paulína Kožuchová

Historio de medicino

Se vi plendas pri nivelo de sanzorgado en via lando, venu kaj komprenu ke ĉiam povus esti pli malbone. Kompilaĵo de ĉiuj plej frenezaj ideoj en medicino dum jarcentoj.

Prelegas: Marta Adamus

KantarVikio:



Unu el la unuaj lokoj kiujn trafas ŝatanto de Esperanta muziko. Sed erarus tiu, kiu kredus ke temas pri nura statika tekstostoko. KantarVikio provizas krom videoj, akordoj kaj notoj unu gravan funkcion: ĉiu povas redakti. Kiel kreigas la plej ampleksa reta Esperanta Kantaro?

Prelegas: Michal Matúšov

Kantoj en ekzotaj lingvoj

Kantoj estas unu el la plej agrablaj kaj efikaj rimedoj por konatiĝi kun lingvoj. Aŭskultado de kantoj ebligas traseri kiel sonas kaj kiel "gustas" lernota lingvo. Venu kaj gustumu diversstilajn (rok-, pop- kaj hiphopajn) kantojn en la feroa, la gronlanda, la karela kaj aliaj intereseaj lingvetoj.

Prelegas: Konstantin Tiĥomirov

Kiel ĉifri interretan komunikon (defendo kaj protesto kontraŭ NSA)

Kiel multaj jam delonge suspektis, evidentiĝis ke ŝtataj sekretaj servoj kiel NSA spionas ĉian interretan komunikon. Tio donas al ili nekredeblan potencon ĉantaĝi homojn. La liberemaj homoj reagu al tio per ĉifrado de la komunikado. La uzo de ĉifrado estu same komprenebla kiel uzo de sekurizado. Tiu ĉi prelego estas ne nur politika pledo por la uzo de ĉifrado sed ĉefe ĝi estas praktika ateliero por homoj, kiuj volas ekde nun ĉifri retpoŝtojn. La bazaj principoj kaj limoj de ĉifrado estos klarigataj. Poste ni vidos kiel instalas kaj uzas ĉifran programaron sur kutima komputilo. Kunportu vian propran komputilon kaj kapabliĝu dum unu horo sendi kaj ricevi ĉifritajn nespioneblajn retpoŝtojn.

Prelegas: Johannes Mueller

Kiel organizi lokan klubon E-agadon?

Ĉu en via urbo ne estas Esperanto-klubo? Aŭ ĝi estas, sed apenaŭ funkcias? Aŭ, eble, vi estas preskaŭ sola Esperantisto en via urbo kaj al vi mankas samideanoj inter lokuloj? Kion fari en ĉi-tiaj

situacioj? Kiel aktivigi vegetantan klubon aŭ fondi novan? Kiel plani, reklami kaj gvidi kursojn? Kiel altiri novulojn kaj reteni veteranojn? Kiel plani regulajn renkontiĝojn kaj organizi festojn aŭ elurbiĝojn? Ĉiuj ĉi tiuj kaj multaj aliaj utilaĵoj, rilataj al loka E-agado, atendas vin dum la prelego-seminario "Kiel organizi lokan kluban E-agadon".

Prelegas: Konstantin Tiĥomirov

Kinejo ☺

Ĉiuvespere estos projekciataj filmoj kun Esperanto-subtekstoj aŭ eĉ rekte dublitaj en Esperanto. Atendas vin diversaj specoj de filmoj – fabeloj, dokumentoj, komedioj, scienc-fikcioj. Detala programo de la filmoprojekciado aperos sur la program-tabulo de SES.

Filmejon prizorgas: Matthieu Desplantes



Konataj/nekonataj esperantistoj

Esperanto jam estas 127-jara. Dum tiuj ĉi jaroj agadis multaj esperantistoj, okazis multaj eventoj, aferoj, renkontiĝoj... Multaj de ni ne konas historion de nia movado. Mi ŝatus proksimigi al vi informojn pri iamaj esperantistoj, ilia vivo kaj agado... Vi ekscios pri i.a. J. Szapiro, L. Einstein, V. Jeroszenko... Preparprelego por la "Esperanta kvizo"...

Prelegas: Nina Pietuchowska

Kuracaj plantoj

Ĉu kuracaj plantoj povas helpi al nia sano? Kiel rekoni kaj utiligi kreskaĵojn, ĉirkaŭ kiuj ni ofte preterpasas aŭ eĉ ilin surpaŝas? Tiujn kaj aliajn respondojn klopodos doni al vi la preleganto.

Prelegas: Stano Marček

Kurso pri ukulelo (laborgrupo kun Esperanto-kantoj)



Ĉu vi havas ukulelon? Ĉu vi ŝatus lerni ludi Esperanto-kantojn? Tiam venu al nia kurso/laborgrupo! Ni havas kantojn ekde la plej facila nivelo (nur 2 akordoj!) kaj altigos la malfacilecon laŭdezire. Vi nur bezonas kunporti vian instrumenton... la bona humuro kutime venas aŭtomate dum la ludado! Kaj se vi (ankoraŭ) ne mem posedas ukulelon: Ni kunportos etan stokon!

Gunar Fischer (DĴ, kantisto) kaj *Sebastian Hoffmann* (multinstrumentisto), ambaŭ: membroj de la Esperanto-muzikgrupo "La Kuracistoj" ekde 2001

Kurso de la feroa lingvo

La feroa lingvo apartenas al la insulskandinavia subgrupo de la ĝermana lingvaro (ĝia plej proksima parenco estas la islanda). La feroan parolas ĉirkaŭ 50 mil personoj, ĉefe sur Feroaj insuloj, kie ĝi estas la sola oficiala lingvo. Aŭskultu pri historio kaj nuntempo de la feroa kaj eklernu kelkajn frazojn en tiu ĉi ĉarma skandinavia lingveto.

Prelegas: Konstantin Tiĥomirov

Kurso de la rusa lingvo

La rusa lingvo estas la plej granda laŭ parolantaro slava lingvo, la oficiala lingvo de Rusia Federacio, Belorusio kaj grava minoritata lingvo en multaj landoj de orienta Eŭropo kaj ekssovetia Azio. Ekscipovu legi la cirilan alfabeton (kiun uzas la rusa lingvo), akiru bazajn sciojn pri la rusa gramatiko kaj fonetiko kaj ellernu kelkajn konversaciajn frazojn.

Prelegas: Konstantin Tiĥomirov

Kurso de la slovaka 2

Daŭrigu lernadon de la slovaka lingvo (post unua leciono dum la „Lingva tago“) – konatiĝu kun „slava Esperanto“, kiel la slovaka estas foje nomata. Lernu la bazon de la plej kompetenta persono:

gvidas aŭtorino de la unua multlingva ret-kurso por la slovaka (realigita de E@I): www.slovake.eu.
Gvidas: Katarína Nosková

Kurso pri Vikipedio kaj Vikinovaĵoj

Ĉu vi volas helpi al Vikipedio aŭ Vikinovaĵoj, sed staras antaŭ la unua paŝo? Aŭ ĉu vi estas spertulo kaj simple ĝuas vikian etoson? Do venu kaj redaktu kun ni! Kunportu komputilon kaj emon, profitu plifacilitan redaktadon, demandu malfacilajn demandojn kaj spertiĝu pri praktika afero kun helpo de spertuloj.

Prelegas: Michal Matúšov, Václav Zouzalík

Kvizo pri naciaj himnoj

Naciaj himnoj estas heredaĵo post niaj antaŭuloj kaj arto kiu celas simboli nian identecon. Esperanto defias la ekziston de nacioj, sed ĝi estas ankaŭ ilo por malkovri aliajn kulturojn. Ĉu vi sciis, ke la finna kaj estona himnoj uzas la saman melodion? Ĉu la himno de Japanio estas la plej mallonga en la mondo? Kaj ĉu vi iam aŭdis la himnon de Bretonio? Aŭ vi eble jam ĉion ĉi scias, ĉar parkerado de himnaj tekstoj kaj faktoj estas via hobbio? Ajnakaze, venu partopreni aŭ almenaŭ spekti nian kvizon.

Prelegas: Marek Blahuš

Lingvo kaj kulturo

Diversaj lingvoj povas esti tre malsamaj. Kiel tio rilatas al kulturo? Ĉu lingvo povas influi kulturon, aŭ kulturo lingvon? Mi prezentos al vi kelkajn interesajn lingvojn kaj kulturojn de la mondo por ilustru tiun temon.

Prelegas: Matthieu Desplantes

Lingvolernado per modernaj interretaj teknologioj: specifecoj, avantaĝoj kaj tiklaj punktoj

Ekesto de interreto influis nian vivon pli multe, ol ni konscias. Per interreto ni aĉetumas, spektas filmojn, nia laboro dependas de internetaliro. Eĉ interpersona komunikado suferas, pli kaj pli anstataŭata per retaj komunikiloj. Interreto ebligis grandan progreson en klerigmetodoj, inkluzive de lingvolernado. Por memlernemuloj ekestas paĝaroj, ĉu pagendaj, ĉu senpagaj, de diversaj teknika kaj enhava kvalitoj. Tamen indas atenti: perreta lingvolernado multe diferenciĝas de la klasika bildo: papera lernolibro, kajero kaj instruisto. Por ke ekestadu vere kvalitaj kursoj, endas bone koni principojn de reta lingvolernado. Tiu ĉi kontribuo estu eta inspiro por lingvo-instruistoj, kiuj ŝatus ekuzi en siaj lecionoj modernajn teknologiojn, aŭ pripensas oferti al siaj lernantoj propran lernomaterialon per interreto.

Prelegas: Katarína Nosková

Lingvaj kurs(et)oj ☺

Mardo estas dediĉita al lingva diverseco – tial vi povas tutan posttagmezon partopreni diversajn prelegojn kaj prezentojn de diversaj lingvoj – la elekto estos riĉa, ĉiu certe trovos ion por si. Krom “tradiciaj” naciaj lingvoj vi havos ankaŭ eblon konatiĝi kun tre interesa lingvo (aŭ ĉu pli bonus diri „lingveto“? :-)) Kurso de „tokipono“ al vi prezentos unikan amuzan lingvon, kreitan de Esperantisto.

Prezentas/gvidas: diversaj SES-partoprenantoj



Mia vizito de Svislando en somero 2013


Imagu landon, kie publika transporto ĉiam iras precize. Imagu landon, kie vi povas veturi kun unu bileto per ĉiuj trajnoj, busoj kaj urbaj amasaj transportoj kaj eĉ ŝipoj. Ĝuste tiel moĝose funkcias publika transporto en Svislando. Kaj kio konkrete vizitindas en tiu ĉi lando? Pri tio mi parolos en tiu ĉi prelego.

Prelegas: Miro-Piro

Meditado – ĉu universala helpilo?

Prezento-diskuto-praktikado: Kio estas meditado? Por kio ĝi utilas? Ĉu eblas facile lerni ĝin? Kiel ĝi rilatas al esplorado de homa konscio? Kiel funkcias nia cerbo? Ĉu ni kapablas regi nian menson kaj atingi internan silenton? Kio okazas kun konscio, kiam ĝi plene trankvilas? Budho – simpla homo kun malsimpla persistemo? Venu aŭskulti, diskuti kaj eble eĉ mediti :)

Gvidas: Peter Baláž



Ni kantu pole

Por kantemuloj kaj ne nur. Ni eklernos kiel lerni kelkajn polajn kantojn en diversaj muzikstiloj. Kono de la pola lingvo ne estas necesa, sed certe utila. Zaśpiewajmy razem po polsku! :)

Gvidas: Ania Liszewska

Ornamado de T-ĉemizoj ☺

La plej bela T-ĉemizo estas tiu, kiun vi mem faris. Vi povas ornamu t-ĉemizon kun via propra desegno per facila tekniko kun blankigilo kaj ŝablonoj. Venu kaj kreu vian EO-ĉemizon laŭguste!

Gvidas: Evka kaj Leon

Origamo ☺

Origamo – antikva japana arto kunmeti el papera kvadrato diversajn figurojn – fariĝis tre populara en la mondo lastan jarcenton. Dum kelkaj minutoj vi sen tondilo kaj gluaĵo kreas floron, papilion aŭ birdon, amuzan figureton de besto aŭ iun “utilan aĵon” (ĉapon sundefendan, koverton, monujon). En origamarto estas amaso da artifiko, kaprompaĵoj kaj aliaj mirindaĵoj, interesaj por plenkreskuloj kaj infanoj. Por infanoj ĝi utilas por disvolvi intelekton, logikan kaj imagan pensmanieron, memoron, plenkreskuloj jam multajn jarojn uzas ĝin en profesia agado por teknika dizajno, arkitekturo, pedagogio kaj artterapiio.

Origamarto, kiel Esperanto, estas siaspeca internacia ilo de interkompreniĝo pro universala “gramatiko”: internacia sistemo de signoj, dank’ al kiu eblas “legi” skemojn de la modeloj kaj fari figurojn. Origamarto estas “festo, kiu ĉiam kunestas”, aliĝu!

Gvidas/prezentas: Leon

Paroligaj rondoj ☺

Ni rekomendas al vi ĉiuj partoprenadi ilin – se vi volas plibonigi vian lingvo-nivelon, ekzerciĝi pri komunikado kaj parolado en Esperanto, la paroligaj rondoj (ĉiuvespere) estas ĝuste por vi! Nepre kontrolu sur la program-tabulo la lingvo-nivelon kaj klason, en kiuj ili okazas!

Polaj langrumpiloj kaj palindromoj

Ĉu vi scipovas legi "w Szczepreszynie chrząszcz brzmi w trzcinie" aŭ "Cecylia czyta cytaty z Tacyta"? Venu kaj ekzercu vian langon! Ni eklernos ankaŭ kelkajn polajn palindromojn – vortojn, kiuj sonas same kiam oni legas ilin ekde komenco kaj ekde fino.

Prelegas: Ania Liszewska

Reĝo de eŭropaj arbaroj

La plej granda eŭropa mamulo, kiu komence de la XX-a jarcento preskaŭ malaperis en Eŭropo. Mia prelegeto permesos al vi ekkoni historion de ĉi tiu besto en Eŭropo, ĝian reprodukon post la unua mondmilito kaj resovaĝigon post la dua.

Prelegas: Nina Pietuchowska

Reklamado de Esperanto

Venu, aŭskultu pri spertoj kaj ideoj je reklamado de Esperanto far aliaj Esperanistoj kaj kundividu tiujn viajn. Ĉu, kiel kaj al kiu (ne)reklami la lingvon internacian?

Prelegas: Konstantin Tiĥomirov

Rektmetoda instruado de Esperanto

Ekzistas multaj metodoj por lerni/instrui lingvojn. Kiel la plej efika montriĝis la t.n. rekta metodo. Kio ĝi estas? Ĉu temas pri la metodo, per kiu nia patrino instruis al ni nian gepatran lingvon? Kiu sen tradukado kaj troa gramatiko instruis al ni rekte pensi en nia lingvo?

Dum SES Stano Marček gvidos rektmetodan paroligan kurson. En aparta prelego li prezentos sian riĉe ilustritan lernolibron „Esperanto per rekta metodo“, kiu aperis en 34 lingvoj, la didaktikan materialon, kiu akompanas la libron, kaj diskutos kun vi pri tio, kiel rektmetode gvidi Esperanto-kursojn.

Prelegas: Stano Marček

Scienca Revuo: legu kaj verku science en Esperanto


La *Scienca Revuo* dum jardekoj kovris ĉiajn sciencojn esperantlingve. Tute laŭ la moto "Parolu pri Esperanto en via gepatra lingvo kaj en Esperanto parolu pri ĉio ajn." Ĝis nun ĝi aperadis nur paperforme kaj eĉ ne havis propran flegitan retejon. Tia retejo estas ĝuste nun evoluigata. La prezento temas pri la novaj ebloj kontribui al la Scienca Revuo kaj legi ĝin kaj pri la planoj disponebligi ĝian tutan arkivon de 1949 ĝis 2012 kaj plu.

Prezentas/gvidas: Johannes Mueller

Veganismo/vegetaranismo por komencantoj

Ĉu vi ne jam estas vegetarano/vegano sed pripensas vegetaraniĝi aŭ ĉu vi antaŭ-nelonge iĝis vegetarano kaj havas demandojn pri praktikaj problemoj rilate al vegetaraniĝo/veganiĝo? Venu kaj ni provos helpi al vi! Se vi estas sperta vegano/vegetarano kaj volas helpi respondi, nepre ankaŭ venu! Bonvena estas ĉiu, kiu scivolemas pri ajnaj demandoj, rilataj al senvianda manĝado. Ni diskutu kune.

Gvidas: Heidi Goes kaj Russ Williams



Verda vivo – niaj manĝkutimoj

Ĉu “verda lingvo” havas rilaton al “verda manĝo”? Venu diskuti la temon pri vegetaranismo, veganismo kaj aliaj manĝo-kutimoj kaj vivo-filozofioj kiuj ekzistas, pri iliaj avantaĝoj, ebloj, kondiĉoj, defioj. Senperforta vivstilo jes ja povas rilati ankaŭ al viaj manĝ-kutimoj. Eble via vivo iĝos eĉ pli verda ol estis ĝis nun! :)

Prelegas: Peter Baláž

Verka/traduka kritika rondo

En kritika rondo verkistoj kaj tradukistoj surloke kune legas paperajn ekzemplerojn de teksto de alia rondano, notas problemojn/demandojn ktp., kaj poste laŭvice donas helpajn reagojn, korektojn, analizojn ktp. al la aŭtoro. Eventualaj komentoj gamas de la plej etaj detaloj ĝis tuta kohero de la verko. Profitinte kritikajn rondojn en mia denaska lingvo, mi opinias ke tia rondo des pli utilas en Esperanto, ĉar ni ĉiuj regas E-on malpli bone ol niajn denaskajn naciajn lingvojn. Laŭ deziro kaj sperto de partoprenantoj mi priskribos la principojn kaj bonajn praktikojn de kritika rondo. Krome mi esperas, ke iuj partoprenantoj alportos proprajn kelkoble presitajn tekstojn (povus esti poemo, mallonga fikcio, kanto-teksto, novaĵ-artikolo, ktp...) kritik-cele por ke ni kune legu, notu, kaj kritiku. BONVOLU ANTAŬANONCU vian intencon partopreni al Russ (cxiomortas ĉe gmail.com) por ke ni planu kiom da ekzempleroj de propra teksto oni presu/kopiu kaj kunportu.

Prelegas: Russ Williams

Vikipedio - filozofio de libera scio

Vikipedion vi certe konas kaj uzas - ĉu por studado, laboro aŭ libertempe. Sed ĉu vi scias, ke ĝin verkas homoj kiel vi? Vikipedio ne estas nur retejo - ĝi estas grava parto de tutmonda libereduka movado. Nia celo estas disponigi scion al ĉiu unuopa persono kaj vi povas esti parto en tio!

Prelegas: Michal Matúšov

Volapuko

Antaŭ du jaroj mi komencis lerni la Volapukon. Mi havis/havas bonegan instruiston. La nuna ĉifalo Hermann Philipps mem instruis min retpoŝte kaj mi povis atingi bonan nivelon en ĉi tiu mistera lingvo. Mi volas prezenti la gramatikon kaj kompari ĝin kun la Esperanta gramatiko. Mi ankaŭ volas klarigi kial la Volapuko estas malfacile lernebla kaj kial ĝi finfine ne povis havi sukceson kiel monda helplingvo.

Atentu, ke mi donos superrigardon pri la hodiaŭ parolata Volapuko II de Arie de Jong. La Volapuko de Johann Martin Schleyer hodiaŭ preskaŭ ne plu estas uzata.

Prelegas: Dirk Joos

TEVA-kongreso: programo

TEVA, Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio, fondiĝis la 16an de aŭgusto 1908 sub la nomo *Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Vegetaranoj*. Ekde 1971 ĝi eldonas seninterrompe sian organon, *Esperantista Vegetarano*. La celo de TEVA estas disvastigi Esperanton inter vegetaranoj kaj vegetarismon inter esperantistoj. Ni provas fari tion ĉeestante Esperanto- kaj porvegetaranajn kongresojn kaj tie disvastigante informojn pri respektive vegetarismo kaj Esperanto. Okaze de ĉi tiu Somera Esperanto-Studado en Nitra okazas la unua ĉi-jarmila TEVA-kongreso. La celo estas multflanka: interkonatigi niajn membrojn, konigi nin al ne-membroj, diskuti kaj diskutigi pri vegetarismo kaj porvegetara agado, informi, kuiri kune... ĉio cele al pli efika agado de esperantistaj vegetaranoj.

Ankaŭ kiel ne-TEVA-membro aŭ ne-vegetarano vi estas bonvena ĉeesti la diskutojn kaj atelierojn de TEVA. Necesas nur krompagi 10 eŭrojn (al organizantoj) por la tuta programo. Ni esperas ke vi ĝuos kaj sukcesos utiligi la programerojn! Bonvenon!



Ĵaude la 17-an

14h - akcepto, bonvenigo, konatiĝo...

14h30 - Prezento de lastatempa agado de TEVA - Heidi Goes

15h - Diskutrondo: Kion faras via landa veg*ana asocio? Kiel vi aktivas en ĝi? - Heidi Goes

16h - Kuirateliero: Kiel fari koktelojn? - Peter Baláž

17h - Prelego kaj posta diskuto kaj gustumado: Ĉu vere lakto estas bona fonto de kalcio? - Helga Bobrova

18h - Diskutrondo: kio estas via opinio pri veganismo? ĉu estas evoluo en via lando de vegetarismo al veganismo? Kiel via landa vegetarana asocio traktas veganojn/ veganismon?

Vendrede la 18-an

Partopreno al la ekskurso al la arboreto Mlyňany (ekskurso F)

Ni tie pasigos tri horojn. Parton ni uzos por diskutrondoj pri:

- kiajn librojn, retejojn vi uzas por informiĝi pri receptoj, veg*ismo, bestaj rajtoj, ktp?

- kiel vi vidas la celon kaj agadon de TEVA? Kial vi (ne) membriĝas? Kion vi faras/povus fari?

Kion TEVA faru? Kion povus fari Landaj Reprezentantoj?

- kiel (ne) paroli kun viandemuloj?

Sabate la 19-an

14h - Historio de TEVA - Christopher Fettes

15h - Kiel kuiri kaj baki sen ovoj? Kiel rapide mem fari panŝmiraĵojn? - Heidi Goes

16h - Kuirateliero: krudaj veganaj kukoj - Heidi Goes

17h - Kuirateliero: diversaj krudaj panŝmiraĵoj - Heidi Goes

18h - Diskutrondo: Kiel estis, kie(l) estu sekva kongres(et)o?

Rim.: Detalan programon de la TEVA-programo vi trovos sur la programtabulo dum la aranĝo.

Priskribo de la program-kontribuantoj

Anna Liszewska

Anna Liszewska studis polan filologion. Ŝi esperantiĝis en 2011 kaj aliĝis al Studenta Esperanto-Klubo "Aŭroro" kaj Silezia Esperanto-Asocio. Dum somero en 2012 ŝi staĝumis en oficejo de E@I. Ĉi-jare ŝi planas organizi en sia naskiĝurbo lingvan kafejon.




Dirk Joos

Mia nomo estas Dirk Joos kaj mi loĝas en Friedrichshafen, kiu situas ĉe la bordo de la Bodenlago en la sudo de Germanio. Mi estas edziĝinta kaj havas du malgrandajn filinojn, kiuj nomiĝas Maya kaj Jasmin. Kvankam temas pri streĉa parto en mia vivo, mi ĝuas ĝin kaj mi ne povus imagi vivon sen infanoj. Mi amas la lingvon Esperanto. Estas granda plezuro por mi skribi kaj paroli ĝin. Bonŝance mi trovis la bonegan lingvohelpanton Peter Weide. Danke al li, mi povis atingi altan nivelon en ĉi tiu grandioza lingvo ene de nur mallonga tempo. Kompreneble mi volas transdoni miajn sciojn. Pro tio mi aktivas kiel lingvohelpanto ĉe "lernu!".




Ekaterina Lozina

Mi estas Miri (Ekaterina Lozina), ekesperantiĝis antaŭ pli ol unu jaro kaj tre ĝojas pro tio. Ankaŭ mi estas membro de Moskva Esperanto-Asocio "MASI". Ĉi tia estos mia dua SES kaj espereble ne lasta.



Eva Fitzelová

Mi nuntempe loĝas en Bratislavo. Kiam mi estis infano, mi ŝatis ludi kun papero, tondi, faldi kaj desegni. Nun mi estas arkitekto kaj mi ŝanĝis mian ŝatokupon en profesion. Mi ŝatas ĉiam ion kreadi.




Johannes Mueller

Mia civila profesio estas materialinĝeniero kaj mi laboras por la firmao Bosch en la kampo de esplorado kaj antaŭevoluiĝo pri la evoluigo de ŝtaloj. Miaj Esperantaj profesioj estas interalie instruisto, muzikisto kaj eldonisto de Scienca Revuo.



Katarína Nosková

Katarína Nosková estas dungito de Edukado@Interreto, kie ŝi laboras pri pluraj (ne nur por-Esperantaj) projektoj orientitaj ĉefe al lingvolernado. Ŝi studis instruadon de la slovaka, la germana kaj Esperanto, kaj estas aŭtorino de la unua retkurso de la slovaka por alilingvanoj www.slovake.eu.



Konstantin Tiĥomirov

Konstantin Tiĥomirov devenas de Rusio sed ekde 2009 loĝas en Pollando. Li finstudis pedagogion kaj ĉefan filologion. Li laboras ĉe UPS kiel importa oficisto por la Norvegia doganejo. En Esperantio li ĉefe okupiĝas pri instruado (li gvidis diversnivelajn kursojn en Rusio, Pollando, Litovio, Slovakio, Germanio kaj Italio) kaj pri loka kluba agado (li fondis kaj dum 3 jaroj gvidis studentan E-klubon "Aŭroro" kaj nuntempe estras Silezian Esperanto-Asocion - ambaŭ organizoj en Vroclavo, Pollando). Ekster Esperantio Konstantin interesiĝas pri lingvoj (precipe la slavaj) kaj lingvoscienco.



Leon Schnelldorfer

Baldaŭ 18-jara studento de ekonomio. Post 10-jara koketumado kun Esperanto mi definitive sukcese esperantistiĝis antaŭ du jaroj. Naĝvartisto kiu ŝatus vidi vin dum SES sportumi kaj havi ĝojon de propra moviĝo. :)



Marek Blahuš

Marek Blahuš estas ĉeĥa esperantisto kaj informadikisto (komputil-lingvisto). Li laboras en la Centro de lingva edukado de la Masaryk-Universitato en Brno (Ĉeĥio) kaj estas estrarano de E@I, kunfondinto de Ĉeĥa Esperanto-Junularo kaj vikipediisto. Li studis en Brno kaj Loveno (Belgio), en 2010-2011 li faris staĝon ĉe E@I en Nancio (Francio) kaj en 2011-2012 ĉe ĜD Interpretado de la Eŭropa Komisiono en Bruselo.



Marta Adamus

Marta Adamus estas studentino de bestkuracado en Naturscienca Universitato de Vroclavo. Ŝi malkovris Esperanton en oktobro 2012 kaj eklernis ĝin ĉe la kurso organizita de Studenta E-klubo "Aŭroro". Ekde tiam ŝi diversmaniere aktivas en vroclava kaj pola E-movado.



Matthieu Desplantes

Mi estas 23-jara komputikisto el Francio, sed mi nuntempe loĝas en Slovakio: mi faris staĝon ĉe E@I en 2011 kaj decidis reveni pasintjare kiel volontulo por tuta jaro. Mi interesiĝas ĉefe pri vojaĝado kaj pri lingvoj. Mi lernis Esperanton en 2007 kaj nuntempe lernas la slovakon kaj la rusan.



Michal Matúšov

Michal Matúšov estas slovakia esperantisto, komputikisto kaj muzikŝatanto. Li aktivas en kelkaj Esperantaj kaj edukaj organizoj kaj projektoj (ekz. SKEJ, E@I, ELiSo, Vikimedio Slovakio).



Miroslav Hruška

(*1989), konata kiel Miropiro estas studento de regiona evoluo kaj publika administrado, membro de la komitato de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj membro de la revizia komisiono de Ĉeĥa Esperanto-Junularo. Krom tio li kontribuas regule al Esperanta Vikipedio, interesiĝas pri publika transporto, fervojo kaj Pollando. Dum somero 2011 li faris staĝon por E@I.



Nina Pietuchowska

Mi estas polino, kiu loĝas en Bjalistoko. Mi estis instruistino pri fiziko, kemio kaj Esperanto, nun pensiulino kiu havas pli multe da tempo por E-agado. Mi gvidis E-kursojn en diversaj landoj.

Mia hobbio: Esperanto, vojaĝoj kaj fotado.



Peter Baláž

Petro naskiĝis en 1979, post studado de hotel-akademio laboris ĉ. 2 jarojn en Germanio kaj Aŭstrio. Iama gvidanto, kunfondinto de Slovakia Esperanta Junularo (SKEJ) kaj ties unua prezidanto (2003-2008). Li vigle agadas precipe en la internacia Esperanto-movado, interalie kiel kunordiganto de E@I (2006-) kaj estrarano de Eŭropa Esperanto-Unio (2005-). Krome li aktivas ankaŭ kiel eldonisto – li estas posedanto de privata eldonejo Espero, kiu eldonas ĉefe Esperanto-varojn. En libera tempo li verkas artikolojn, filmas, okupiĝas pri grafikaĵoj. Hobioj: psikologio, metala muziko, libroj, scienc-fikciaj filmoj, meditado.



Russ Williams

Russ Williams (Ruselo) fojfoje verkas kaj tradukas por Esperantaj periodaĵoj kaj konkursoj kiam li ne distrite ludas abstraktajn strategiajn ludojn.



Stano Marček

Stano Marček estas slovaka esperantisto. Li laboras kiel redaktoro de revuo Esperanto, kaj antaŭe estis redaktoro de la revuoj Esperantisto Slovaka, Esperantista Vegetarano kaj Heroldo de Esperanto, kaj li kunlaboris kun Monato. Jam antaŭe li verkis librojn (interalie proprajn kolektojn de krucvortenigmoj), nuntempe li ankaŭ mem eldonas ilin, interalie la lernolibron *Esperanto per rekta metodo*, kiu aperis en multaj tradukoj. En la 1980-aj kaj 1990-aj jaroj li laboris kiel manaĝero de la sukcesa ĉeĥoslovaka muzika grupo Team' kiu kantis ankaŭ en Esperanto. En sia junaĝo li aktivis en la slovaka Esperanto-movado kaj gvidis kursojn de Esperanto, nuntempe li ekde 2010 estas prezidanto de SKEF (Slovakia Esperanta Federacio).



Václav Zouzalík

Studento de informadiko, kontribuanto en projektoj de Wikimedia Fondaĵo kaj interesiĝanto pri multaj aferoj; eksstaĝanto de E@I kaj kreinto de retejo tokipona.info



Vespera programo

Nacia vespero (13.7.) ☺

Dum la nacia vespero estas nia celo prezenti al vi elektitajn partojn de tipa, regiona kulturo, folkloro de Slovakio. Ĉi-jare prezentos ĝin speciala folkloro ensemblo "Rodina Hlbocká" (Familio Hlbocka) el la urbo Piešťany – temas pri familia grupo, en kiu sinprezentos la gepatroj Peter kaj Katarína, kun siaj 7 infanoj, kiuj ĉiuj kunludas kaj kantas. Ili prezentos al vi kaj ludos por vi tradiciajn slovakajn kantojn, prezentos kelkajn tipajn kaj malpli tipajn instrumentojn kaj etosigos vian vesperon. Pli da informoj pri ili vi trovos ĉe: <http://www.rodinahlbocka.sk/>



Vingustumado (13.7.) ☺ ☺ ☺



Regulaj SES-partoprenantoj jam devas esti veraj vin-fakuloj. Ankaŭ ĉi-jare ne mankas profesie gvidata gustumado de la plej bonaj vinoj de la regiono. Venu gustumi kvalitajn vinspecojn, ĉifoje el la fama, surloka vinproduktejo "Vino Nitra".

Internacia vespero (19.7.) ☺

Dum internacia vespero amuzas la partoprenantoj la partoprenantojn. Dum ĉi tiu vespero vi havas eblon (kaj unikan, neripeteblan ŝancon :-)) prezenti al aliaj vian talenton, viajn kapablojn, vian artemon. Elektu kanton, dancon, deklamadon aŭ ion alian, kaj prezentiĝu kun via programero – por ke la vespero estu vere amuza kaj internacia. Jam anticipe kontaktu gvidantojn pri la detaloj.

Gvidantoj de la vespero: Marta Adamus kaj Anna Liszewska

NOPROBLEM ☺ (17.7.)

La muzikgrupo NOPROBLEM formiĝis en 2001. Unuafoje koncertis la kapelo - ankoraŭ sennoma - en majo 2003 en preĝejo en Kostelec (Ĉeĥio). Tio allogis novan muzikemulon kaj la grupo daŭre kreskis. Nuntempe la kapelo ludas ĉefe kantojn de "Spirituál kvintet", sed foje ankaŭ tramping kaj kantri-muzikon. Ilia nomo estis fine ŝanĝita al „NOPROBLEM Kostelec na Hané“ kaj la membronombro fiksiĝis je 8. La kapelo regule koncertumas en la tuta regiono kaj pasintjare aperis ilia unua oficiala KD.

En Esperanto ili ekis ludi nur en 2013, kaj dum ĉi-koncerto ili ludos unuafoje ĉiujn, ĝis nun 6 kantojn, adaptitajn de la ĉeĥa al Esperanto. Krome - donaco al vi ĉiuj: senpaga KD "Senprobleme en Esperanto", kun 6 registritaj kantoj en Esperanto kaj 7 en la ĉeĥa!

.....



Kimo ☺ (15.7.)



Kim J. Henriksen el Danio estas denaskulo, legenda famulo de la junulara Esperanto-movado kaj de Esperanta rokmuziko en la 80-aj kaj 90-aj jaroj, ĉefa etoso-kreanto de multaj junularaj internaciaj renkontiĝoj.

Li estis unu el la fondintoj de la muzika grupo Esperanto Desperado en 1996, kiu unue nomiĝis Brokantaĵoj. Li estis kantisto kaj akordionisto en tiu grupo. En 1982 li estis ano de la grupo Amplifiki kun Martin Wiese, Aline Boulet, Isabelle Rome, Bertilo Wennergren kaj Micke Englund. Li verkis kaj kantis la plej faman kaj popularan kanton de Esperanta rokmuziko: Sola.

.....

Kaŝi ☺ (16.7.)

Kaŝi (veranome Carsten Schnathorst) estas germana muzikisto kaj esperantisto. Li venas de Osnabrück kaj loĝas en Hamburgo. Tie li ludas ĉe la bando The living Music Box. Carsten kantas kaj ludas pianon. Lia kantaro enhavas proprajn kantojn kaj bone konatajn el la tuta mondo.

Dum SES li mojosigos la korojn de la publiko per sia mikso de propraj Esperantaj kantoj, internacia furora muziko kaj aliaj konataj Esperanto-kanzonoj kaj pere de sia markanta voĉo.

.....



Martin kaj la talpoj ☺ (18.7.)

Martin Wiese (naskiĝis la 26-an de marto 1963) estas la ĉefkantisto kaj gitaristo en la Esperanta rokbando Persone. Antaŭe li estis membro de la grupo Amplifiki. Intertempe li ankaŭ koncertas sole kaj kun grupo Martin & la talpoj eldonis soloalbumon. Kun ili li prezentiĝos ankaŭ ĉi-SESe, do roka etoso garantiata!

.....

JoMo ☺ (14.7.)

JoMo (t. e. Jean-Marc Leclercq) estas franca kantisto kaj esperantisto. Li venas de Liono, nun loĝas en Tuluzo. Antaŭe li estis kantisto en la grupo Les Rosemary's Babies (La Rozmariaj Beboj).

Li montras rimarkeblan progreson al lingvodiverseco pere de muziko. Li havas tradician kaj rokan kantrepertuaron en 22 lingvoj, interalie Esperanto. Per tio li eniris la Guinness-libron pri rekordoj. Dum SES li etosigos kaj dancigos vin per siaj diverslingvaj kantoj, plenaj je ĝojo kaj energio.



Adiaŭa vespero ☺ (19.7.)

Lasta vespero de SES devas esti la plej bona! :-) Ni disdonos kelkajn premiojn, ne rajtas manki la SES-kanto, statistiko pri la aranĝo, adiaŭoj, dankoj kaj kompreneble – bonega etoso kaj loooonga amuziĝo lastnokta.



Aldonaj programeroj

Noktumado

Diskejo ☺

Ĉiunokte atendas vin diskotekoj kun internacia muziko de diversaj muzikstiloj. Tuj ene de la drinkejo, kiu samtempe estas diskejo, vi havos eblon eluzi vian energion, se ajna restos al vi post la tuta tago :) Amuzemaj kaj dancemaj partoprenantoj, nepre venu kaj etosigu la noktan vivon dum SES! Krom la lokaj doĵooj etosigos vin ankaŭ fama Esperanto-DĴ Gunnar!

Drinkejo ☺

Ĉiutage ekde la 13a ĝis la nokto nokto fin' estos malfermita la drinkejo kun bongustaj drinkaĵoj, kie vi povos pasigi vian tempon antaŭ kaj post la koncertoj, aŭ dum la tago, se vi soifos. Afablaj drinkejestr(in)oj garantios la bonan etoson :) (kaj vi utiligu la ŝancon instrui ilin Esperanton! :)

Gufujo ☺

Tradicia ejo de Esperanto-aranĝoj: teejo, kun eblo trankvile, en silento ĝui la etoson, babili kun amikoj, ripozi, gustumi teojn. Ĉu diskejo tro bruas por vi? Do jen la gufujo – la ĝusta loko por vi! *Gufujon prizorgas: Johannes Mueller, Eva Fitzelová. Funkcias ĉiunokte, ekde ĉirkaŭ 22:30*

Sportumado ☺


Dum la tuta aranĝo estas je via dispono diversa sport-ekipaĵo kaj eblo sporti. Senpage disponeblas: tablotenis, teniso, badmintono, uzado de sportejo.

Bv. kontakti organizantojn aŭ viziti la organizan ĉambron, por ricevi tie la sportan ekipaĵon.

Prizorgas la sportan programon: Leon Schneldorfer

Ekspozicio „ALTERNATIVOJ“ ☺

Dum la ĉi-jara SES atendas vin (denove) eta ekspozicio – temas pri kelkdeko da diversspecaj bildoj, kiuj estas grupigitaj laŭ diversaj kategorioj (ekologio, ekonomio, edukado, humuro, ktp.). La celo de la bildo-kolekto estas prezenti ĉi-maniere, ke tamen „alia mondo eblas“. Ne temas pri iu „serioza ekspozicio“ (plejmulto de la bildoj estas elŝutitaj de la interreto), sed pli pri provo atentigi SES-partoprenantojn pri diversaj temoj, kiuj rilatas nin ĉiujn. Nia celo estas pensigi, kelkfoje amuzigi kaj diskutigi – ankaŭ tiaspecaj bildoj estis do intence elektitaj. Pluraj bildoj same taŭgus en



pli da kategorioj. Se iu el la bildoj hazarde iun ŝokus, ofendus, aŭ simile, ni petas anticipe pri pardono. Volonte informu nin pri via opinio pri la temoj de la bildoj, aŭ venu diskuti iun el la temoj dum la „Paroligaj rondoj“. Esperanto (same kiel kelkaj aliaj temoj prezentitaj en la ekspozicio) estas alternativo – lingva. Ke ekzistas ankaŭ aliaj alternativoj, volas demonstri la bildo-kolekto.

Libroservo ☺

Por ke la Esperanto-kulturo ne nur transvivu, necesas ĝin prizorgi kaj samtempe subteni. Ambaŭflanke helpas libroservo de eldonejo ESPERO dum tuta SES, inter 14:00 kaj 18:00. Venu do aĉeti Esperanto-varojn por: kleriĝi, lerni, amuziĝi, muzikumi, filmumi, vestiĝi... kaj samtempe por subteni la verdan kulturon :-). Atentu! Dum SES estos pluraj varoj rabatitaj, speciala SES-oferto nur 1-foje jare! E@I kaj ESPERO proponas ankaŭ kelkajn novaĵojn kontraŭ favora prezo. Profitu!

Koverta poŝto ☺

Aranĝu vian propran poŝtkeston ĉe SES! Prenu kovrilon, subskribu kaj ornamu ĝin laŭ via plaĉo. Pendigu ĝin sur la afiŝmuron kaj via komunikado kun aliaj uzantoj de SES povas komenciĝi. Vi povas skribi (lasi mesaĝojn) al aliaj partoprenantoj kaj ili povas skribi al vi. Bonega metodo, precipe por komencantoj, kiel komenci komuniki en Esperanto. P.S.: Bonvolu ne enmeti spamon :-)

Ekskursoj ☺

Tuttagaj:

A: Bratislava

(prezo: 27 EUR, dato: 2014-07-16)

Vizitotaj lokoj: burgruino Devín, Bratislava kastelo, malnova urboparto, kaj io pli...

Bratislava estas ĉefurbo kaj la plej multe loĝigata urbo de Slovakio (pli ol 425 mil loĝantoj). En la urbo havas sidejon la ŝtatrezidanto, registaro, parlamento, diversaj oficejoj kaj ministerioj, ankaŭ pluraj universitatoj, teatroj, muzeoj kaj aliaj kulturaj kaj sciencaj institucioj. Bratislavo situas sur ambaŭ bordoj de la rivero Danubo, sur montarpiedo de Malgrandaj Karpatoj. La urbo estas proksime de Ĉeĥio, Aŭstrio kaj Hungario. Ĝi estas la unusola ĉefurbo en la mondo, kiu limas samtempe kun du landoj (Hungario kaj Aŭstrio).

En la areo de la urbo estis trovitaj viv-spuroj eĉ de ŝtonepoko. Ĉirkaŭ 400 a.K. – 50 a. K. en la areo loĝis keltoj, kiuj konstruis tie sian fortikaĵon. Ekde la 1-a ĝis la 5-a jarcento tra la urbo kondukis limo de Roma Imperio. Ekde la 6-a jarcento sur la loko de la urbo ekloĝis la unuaj slavoĵoj. En la jaro 907 aperis la unua skribmencio pri Bratislava en salzburgaj analoj. Dum la jaroj 907 – 1918 Bratislavo estis parto de Hungara reĝlando kaj dum la jaroj 1536 – 1784 ĝi estis eĉ la ĉefurbo de Hungara reĝlando. La urbo estis parto de Ĉeĥoslovakio inter 1919 kaj 1992, krom dum la ĥaosa milita periodo de 1939-1945, kiam ĝi estis ĉefurbo de slovak marioneta ŝtato sub nazia rego. Ekde la jaro 1993 Bratislavo estas ĉefurbo de memstara Slovakio.

Ekde 1946 la **urbo Devín** estas parto de Bratislavo (8 km for de la centro de la urbo), kiu situas sur montetoj kaj deklivoj ĉe kunfluejo de la riveroj Danubo kaj Moravo. La vilaĝo estis menciita unuafoje en la jaro 1237 en la formo villa Thebyn. En la 13-a jarcento la hungara reĝo fortikaĵo estis konstruita en la loko kaj ricevis la nomon Dyven. En 1809 armeo de Napoleono detruis la fortikaĵon. Ľudovít Štúr tie komencis naciismajn movadojn de la slovakoj en 1836.

En la areo de la urbo estis trovitaj viv-spuroj eĉ de ŝtonepoko. Ĉirkaŭ 400 a.K. – 50 a. K. en la areo loĝis keltoj, kiuj konstruis tie sian fortikaĵon. Ekde la 1-a ĝis la 5-a jarcento tra la urbo kondukis limo de Roma Imperio. Ekde la 6-a jarcento sur la loko de la urbo ekloĝis la unuaj slavoĵoj. En la jaro 907 aperis la unua skribmencio pri Bratislava en salzburgaj analoj. Dum la jaroj 907 – 1918 Bratislavo estis parto de Hungara reĝlando kaj dum la jaroj 1536 – 1784 ĝi estis eĉ la ĉefurbo de Hungara reĝlando. La urbo estis parto de Ĉeĥoslovakio inter 1919 kaj 1992, krom dum la ĥaosa milita periodo de 1939-1945, kiam ĝi estis ĉefurbo de slovak marioneta ŝtato sub nazia rego. Ekde la jaro 1993 Bratislavo estas ĉefurbo de memstara Slovakio.

B: Banská Štiavnica

(prezo: 27 EUR, dato: 2014-07-16)

Banská Štiavnica estas historia urbo en meza Slovakio, kun tre multkultura pasinteco. Ĝi estas konata per minado de metaloj (ĉefe de arĝento), per gravaj minejaj juro, administracio kaj akademia tradicio. Ni spertos malsupreniron en subteran minejon ĉe Subĉiela Minmuzeo, ĉiu ekipita per kasko, lampo kaj mantelo. Post



tagmanĝo en pensiono ni vizitos mineralogian ekspozicion kaj la vendejon Verkoj de slovakiaj belartistoj. Nian ekskurson ni finos en la teejo Divná pani. La urbo mem estas enskribita en la Unesko-listo de kulturaj heredaĵoj.

Duontagaj:

D: Urbo kaj kastelo Nitra (perpiede)

(prezo: 7 EUR, dato: 2014-07-13)



Nitra estas la plej malnova urbo de Slovakio, kiun kronikoj mencias jam en la 9-a jarcento. La unua skriba mencio devenis el 880, kiam Nitra estis episkopejo de Grandmoravia Regno. Nitra estas urbo de eksterordinara historia graveco. Komencoj de ĝia prisetlado estas en pratempo, kiel tion pruvas la arkeologiaj trovitaĵoj sur la urbo-tereno. Jam antaŭ 30 mil jaroj ĝi estis dense loĝigita areo. Areo de la nuna Nitra estis grava loko de keltoj (jam kelkajn jarcentojn antaŭ Kristo), pli poste de ĝermanoj kaj fine slavoj. Ĝi

estis sidejo de unuaj konataj regantoj de la nuntempa regiono de Slovakio – germanaj triboj "kvadoj" (ĉ. j. 396 p.K.) kaj ekde la 8-a jarcento ĝis 1108 sidejo de la Nitra-princlando.

La plej fama historia memoraĵo kaj dominanto de la urbo estas kastelo el la 11-a jarcento, en la 15-a jarcento rekonstruita kaj ankoraŭ ŝanĝata en la epoko de baroko. La kastelo estis konstruita sur la loko de la slava setlejo de la 9-a jarcento. Ĝi estas nacia kultura heredaĵo. Hodiaŭ ĝi estas sidejo de la arkeologia departemento de SAV (Slovaka Akademio de Sciencoj) kaj de episkopo. Viziteblaj estas la katedralo kaj la dioceza muzeo.

E: Topoľčianky

(prezo: 15 EUR, dato: 2014-07-15)

Topoľčianky estas ne tre granda civito, sed tamen kun multaj vidindaĵoj. Unua skrib-notita mencio pri la civito estas el la jaro 1293. Tamen jam en la 6-a kaj 7-a jarcento ĉi tie loĝis slavo. La ekskurso havos buntan programon, ni vizitos la plej vidindan:

- Vin-produktejon (kun vingustumado): la vinproduktejo Topoľčianky produktas 5 milionojn da litroj de vino jare, kaj per tio ĝi estas unu el la plej grandaj vinfarantoj en Slovakio;

- Burgon el la 15-a jarcento: ekde la jaro

1890 la posedaĵon aĉetis Habsburga familio, kiu posedis ĝin ĝis la disfalo de la monarkio. Jozefo Aŭgusto Habsburga tre ekŝatis la lokon, riĉigis la ekipaĵon de la burgo, grandigis la parkon, fondis la ĉevalojn kaj ĉeval-bredejon kaj la ĉasistan kastelon. Post la disfalo de monarkio la kastelon aĉetis registaro de Ĉeĥoslovakio kaj ĝi iĝis somera sidejo de prezidentoj de ĈSR. Regule ĉi tie estadis ĉefe prezidento Tomáš Garrigue Masaryk. La kastelo estas nacia kultura heredaĵo.



F: Arboreto Mlyňany

(prezo: 10 EUR, dato: 2014-07-18)

Arboreto Mlyňany de Slovakia Akademio de Sciencoj (arboreto – kolekto de arbospecioj) estas protektita areo ĉe la komunumoj Tesárske Mlyňany kaj Vieska nad Žitavou (distrikto Zlaté Moravce). Ĝi okupas 67 hektarojn. En la jaro 1951 ĝi estis deklarita kiel protektita areo. Nuntempe ĝi estas scienca laborloko de Slovakia Akademio de Sciencoj. Fondinto D-ro Štefan Ambrózy-Migazzi el Hungario estis ekde sia infanaĝo granda ŝatanto de botaniko. Kun sia edzino el Zlaté Moravce, Antónia, li konstruigis kastelon apud Vieska nad Žitavou, rande de arbaro. Ĝuste en tiu ĉi arbaro li komencis provi planti unuajn alilandajn arbospeciojn.

Hodiaŭ estas la arboreto la plej signifa arbologia institucio en Slovakio. Ĝiaj kolektoj enhavas pli ol 2300 arbospeciojn el Mediteraneo, Ameriko, Afriko kaj Azio.



SES-kanto

Jen, tiuj kiuj jam ĉeestis, bone konas la neoficialan himnon de SES :-). Kiuj ne ĉeestis, tiuj povos ĉi-jare ĝin certe aŭdi kaj danke al la teksto sur tiu ĉi paĝo ankaŭ parkerigi kaj kunkanti ĝin dum la adiaŭa vespero:

SES-kanto (2009)

Ho mi tiome lacas
kaj la kapo doloras
pro la dumtutataĝa studado tie ĉi.
La vetero tro varmas
kaj preskaŭ mi larmas
kaj plej verŝajne estas same kiel vi.

Rekantaĵo:

Sed tamen ĝojas ni esti ĉi tie
por lerni diversaĵojn pri lingvoj kaj la mond'.
Foje diskutas pri mondopolitiko kaj
ĝia signifo por nia estont'.

Ĉar la ejo tro grandas
homoj ofte perdiĝas
en la koridoraro de la multangula dom'.
Ĉar la vojoj ege longas
ni ofte forgesas
dum la voj' en kiu ĉambro okazas la studad'.

La manĝaĵo 'stas bona
senfrukta senlegoma
sed multe da blankaj farunaĵoj manĝas ni.
La trinkaĵoj tro dolĉas
kaj kolore ne plaĉas.
Prefere nur akvon de la krano trinku vi!

Ni tre volas danki
al la organizantoj
por la senlaciĝema laboro de vi.
Venontjare vi refaru
kaj denove invitu
komencantojn kaj lingvospertulojn tien ĉi.

Lasta rekantaĵo 2x:

Ĉar ege ĝojis ni esti ĉi tie
kaj kune vojaĝi al la sekva renkontiĝ'.
Librec' nin alvokas kaj volonte ni sekvas
Per komuna vojaĝo espereble sen stopiĝ'.

Melodio: Suoma popolmelodio „Valso de Emma“

Teksto: Jonas Dalmose kaj Johannes Mueller



SES 2014
Nitra



SES 2014 okazas sub la aŭspicio de:

- Ministro de Edukado, Scienco, Esploro kaj Sporto de la Slovaka Respubliko – Dušan Čaplovič
- Prezidanto de la Nitra-a memrega distrikto – Milan Belica
- Urbestro de la urbo Nitra – Jozef Dvonč

Organizantoj de SES 2014:

E@I (Edukado@Interreto): www.ikso.net
SKEJ (Slovakia Esperanta Junularo)
<http://skej.esperanto.sk>

Subtenantoj de SES 2014:

Eldonejo ESPERO: www.espero.sk
Urbo Nitra: www.nitra.sk
UKF (Univerzita Konštantína Filozofa):
www.ukf.sk
Projekto lernu!: www.lernu.net
UEA: www.uea.org
TEJO: www.tejo.org




Profitu la eblon (re)veni al Slovakio por Esperanto!

Ĉu vi ŝatis SES? Ĉu plaĉis al vi en Slovakio? Ĉu vi volas plu Esperantumi?
Dum la sekva duonjaro okazos ankoraŭ 2 internaciaj Esperanto-aranĝoj en Slovakio:
KAEST (<http://kaest.ikso.net>) kaj
POLUDNICA (<http://poludnica.esperanto.sk>)
Nepre pripensu viziti ilin kaj ekkoni ankaŭ aliajn partojn de Slovakio!



Partoprenintoj de SES 2013, Martin – komuna foto de A. Sochacki

Mapo por SES 2014



lĩnh vø.ínhf

Esperanto

मराठी

أرضو

Lifelong Learning Programme

Tiu ĉi projekto estas financata per subteno de Eŭropa Komisiono. Tiu ĉi publikaĵo respegulas nur vidpunkton de la aŭtoro, pro tio la Komisiono ne povas esti respondeca pri ajna uzado de informoj, kiuj aperas ĉi tie.